


La surfaco de la asteroido Eros



Esperanto sub la Suda Kruco

Septembro-Oktobro 2001
Numero 53 (vol. 9, no. 5)



ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Numero 53 (volumo 9, numero 5), Septembro-Oktobro 2001

Redaktoro: Donald Broadribb
PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

☎: (08) 9641 1134

E-poŝto: sudakruco@sudakruco.org

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo,
143 Lawson St Redfern, NSW 2016,
Aŭstralio. E-poŝte:

libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road,
Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte:
hazgreen@tmba.design.net.au

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso sudakruco@sudakruco.org; vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mg aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitaĵajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

La kovrilbildo: Foto de la surfaco de la asteroido Eros, farita de fotilo en la spacveturilo NEAR la 27an de junio 1997. I.a., la foto helpis pruvi ke tiu asteroido estas solida planeteto, kaj ne nura pulvorakumulajo.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Humuro en Esperanto (D. Rogers)...	3
Malgranda superrigardo de la internacia patent-sistemo (Roland Rotsaert)	10
Diversaĵoj.....	14
Skribas la legantoj	15
(Rudolf Koppel, Hazel Green, Ken Rolls)	
Laŭ mia vidpunkto (Kalle Kniivalä)	16
Deziras korespondi	17
Apelacio al la konscienco de la homaro	18
Interrete	18
Beatigo de Prelato Johann Schleyer	24
El la regionoj	25
Odlo Bokserj: Lia paĝo.....	26

Recenzoj:

James Branch Cabell: <i>Jurgen</i> (DB).....	9
Thomas a Kempis: <i>Ni sekvu Kriston</i> (DB).....	9
<i>Brazila Esperantisto</i> (DB)	9
<i>Ralph Harry: Adventures in Esperantoland</i> (DB.)	10
Revuoj legeblaj per Interreto (DB)	20

English Supplement

New Translation Competition

ESK estas legebla per Interreto:

<http://www.esperanto.org.au/esk>

Limdato por artikoloj por la novembra numero: 17 oktobro.

HUMURO EN ESPERANTO

de Donald Rogers

Kio estas humuro?

Iuj pensuloj provis analizi humuron. Ili diris ke humuro estas speco de stimulo kiu emas atingi la ridrefleksion. Ĝenerale, humuro igas la aŭskultanton percepti la situacion en du (aŭ pli) mem-konsekvencaj sed neakordaj referencokadroj samtempe. Kaj la kreado de subtila ŝerco kaj la rekreada ago percepti la ŝercon enhavas la ĝojigan mensan ŝoketon de subita salto de unu kunteksto al alia. Komikisto provas krei streĉitecon ĉe la aŭskultantoj, kiu kreskas dum la rakonto progresas. Ĝi neniam atingas kulminon. La frapfrazo haltigas la logikan evoluigon de la rakonto. Ĝi senblagigas la dramecan atendon. La streĉiteco liberigas kiel ridado.

Inter geamikoj: Mi aŭdis ke ĉiu kvara homo suferas pro mensaj peturboboj. Miaj tri geamikoj estas tute sanaj. Ĉu mi nun konsultu kuraciston?

[Monato sept. 2000, p 26]

Specoj de humuro

Multaj homoj opinias ke kalemburo estas la plej malalta speco de humuro. Eble ĝi estas la plej primitiva. Ĝi dependas de la simileco de la sono de du esprimoj. Tamen aliaj specoj de humuro ankaŭ dependas de sono. Komikaj poemoj prosperas pro la melodiana unuiĝo de nekongruancoj, ekzemple la “brasikoj kaj reĝoj” de Lewis Carroll, kaj la kontrasto inter nobla formo kaj la bagatela enhavo.

Senenca poemo atingas komikan efikon per la ŝajno havi sencon, igante la leganton imagi sencon en la fonetika formo. Mi trovis tri tradukojn de “Jabberwocky” de Lewis Carroll en Esperanton! Jen la unuaj

du strofoj de tiu de Marjorie Boulton, “La Ĵargonbesto”:

Brilumis, kaj la ŝlirtaj melfoj en la iejo ĝiris, ŝraŭis; mizaris la maldikdudelfoj, forfuraj ratjoj vaŭis.

“Evitu, filo, Ĵargonbeston!”

– Ungoj kaj buŝ’ por mord’ kaj kap!’

Evitu bombonbirdan neston!

Vin gardu kontraŭ Bendorapt!’”

Satiro estas vorta karikaturo, intence distordita bildo de homo aŭ societo.

Ne ĉia humuro estas komika por ĉiu homo, precipe en la nuna epoko de “politika ĝusteco”. Foje ŝerco ne stimulas eĉ rideton; foje eĉ naŭzon.

Ĉe floristo: Ĉu vi havas karnovorajn plantojn?

Certe. Kiom grandan vi deziras?

Hm, ĝi estas donaco al mia bopatrino, kiu pezas ĉirkaŭ 85 kilogramojn.

[Monato sept. 2000, p 26]

En la nuna epoko estas malfacile ŝerci sen ofendi iun ajn. Multaj evitas ŝercojn pri Irlandanoj aŭ aliaj rasoj aŭ grupoj. Tiaj estis popularaj antaŭ unu generacio. Ekzemple Nov-Zelanda aŭtoro Tom Scott, krom ridindigi politikistojn (kaj ili estas licaĵoj, ĉu ne?), ankaŭ amuze rakontas ŝajne hontindajn aferojn pri si mem kaj sia familio. Sendube li troigas, sed tio estas la arto de rakontado. Multaj ŝercoj estas nur por malpruduloj. Oni devas atenti pri la enhavo de ŝercoj por ne ofendi.

Vilĉjo diris al mi ke li rimarkis diversajn reagojn al ŝercoj. Norvegoj ĝenerale ridas trifoje je ŝercoj: unue kiam oni rakontas la ŝercon, due kiam oni klarigas la ŝercon, kaj trie ki-

am ili komprenas ĝin. Aliflanke, Germanoj ridas nur dufoje: unue kiam ili aŭdas la ŝercon, kaj due kiam oni klarigas ĝin. Ili neniam komprenas ĝin. Usonanoj tamen ridas nur unufoje: kiam oni rakontas la ŝercon. Ili ne permesas ke iu klarigu la ŝercon al ili.

La medioj de humoro

1. komedio (en filmoj kaj aktorado sur scenejo, humura mimo)
2. karikaturo (amuzaj desegnaĵoj)
3. lingva (parola kaj presita) ŝercado

En ĉi tiu artikolo nur la tria estas pridiskutata.

Specoj de ŝercado

En sia artikolo pri Esperanta humuro, David Jordan distingas kvar specojn de ŝercado:

1. lingvosendependa
2. lingvodepnda
3. kulturodepnda
4. interlingva

Por esti sendepnda de kaj lingvo kaj kulturo, oni ĝenerale devas uzi internaciajn unuojn (metran sistemon), eviti aludojn al klasika mitologio, kaj citaĵojn en aliaj lingvoj, ĉar la aŭdanto/leganto ofte ne havas la saman edukan aŭ kulturan fonon. Oni povas argumenti ke kulturosendepnda ŝerco ne ekzistas. Eĉ

Mi ne havas bonan solvon, sed mi admiras vian problemon.

(ESK 49, p16)

Se ekzistus socio kie oni ne emas paroli pri problemoj kaj solvoj, oni ne komprenus tion.

Jordan skribis ke ekzistas limigoj de humoro en Esperanto.

Unue: Ĉar Esperanto estas uzata de tre diversaj homoj, oni devas atenti ĉu la kultura kunteksto de la ŝerco estas tradukebla.

Due: la plejmulto da Esperantistoj parolas ĝin neperfekte. Tial oni utiligas simplajn ŝercojn, kiuj ne ridigus en aliaj lingvoj. Spertaj parolantoj ĝuas envolvitajn ŝercojn ĉar tio montras ilian mastradon de la lingvo.

Trie: la Esperantistaro havas kunajn spertojn, kiujn “malsamideanoj” ne spertis. Tiuj spertoj provizas temojn por enaj ŝercoj.

1. Lingvosendepnda ŝercado

Tiu baziĝas sur la enhavo de la ŝerco kaj estas tradukebla de unu lingvo al alia. Eĉ en “Fundamenta Krestomatio” Zamenhof citis multajn tiuepokajn anekdotojn, ekzemple:

“A: Kial Hanibalo iris trans la Alpoj?”

B: Ĉar tiam la tunelo ne estis ankoraŭ preta.”

Tiu ŝerco estas kulturodepnda, ĉar oni devas scii iomete pri la historio de Hanibalo.

En la lernolibro de Richardson (p284):

En la kazerno: La soldato plendis, ke en la supo estis sablo kaj tero. Nun li staras antaŭ la komandanto.

“Vi plendis pri la manĝaĵoj, ĉu ne? Ĉu vi estas en la armeo por frandi aŭ por servi vian patrujon?”

“Jes, komandanto, por servi ĝin, sed ne por manĝi ĝin.”

Butler metis multajn simplajn ŝercojn en sian lernolibron, ekzemple:

Edzino: Imagu, Henriko! La horloĝo falis de la muro. Se tio estus okazinta unu minuton antaŭe, ĝi frapus mian patrinon.

Edzo: Mi ĉiam diris, ke la horloĝo malfruas.

(Butler: 213)

“Vi estas tre malgaja!”

“Jes. Mi perdis la okulvitrojn; kaj mi

ne povos ilin serĉi, ĝis mi trovos ilin.”

(Butler: 142)

“Oksigenon oni eltrovis antaŭ nur cent jaroj. Sen oksigeno neniu povas vivi.”

“Nu, kiel oni vivis, antaŭ ol ĝi eltroviĝis?”

(Butler: 185)

“Ankaŭ tio estas libereco: laboregi kiel sklavo — se mi volas”.

(R Schwartz)

2. Lingvodependa ŝercado

Tiu speco utiligas specialajn ecojn de sia origina lingvo kaj estas malfacile traduki ĝin al alia lingvo.

Ekzemplo en la Angla estas pluraligi la vorton “spouse” al “spice”. Eĉ se la cellingvo havas ekvivalentojn de tiuj du vortoj, estas malverŝajne ke la dua havas la sencon de “spico”.

Ekzemploj Esperantaj:

Literaturo — litera-turo — lit-era-turo

“Ĉu vi havas bastonon?”

“Ne, mi ne havas bas-tonon: mia voĉo estas baritona.”

“Li estas amiko intima.”

“Sed kial li timas inon?”

(Butler: 63)

Per kiu litero oni faras juvelon?

Per L. (perlo)!

Kial vi amas tiun kantiston?

Ĉar li estas ĉarma persono (per sono)!

(Butler: 128)

Lingvodependa ŝercado estas la plej interesa. La plej fama Esperanta verkisto en tiu genro estas Raymond Schwartz. Li estis majstro de la mistranĉo de vortoj por fari surprizajn kalemburojn. Tiu estas ofta ilo por lingvodependa humuro en Esperanto.

William Auld recenzis la verkon de Schwartz tiel: “gravas la kaŝitaj signifoj, kiujn la Verda Klaŭno (se vi

pardonas tiun epiteton, aŭ epitegon) sukcesis elmini el ili”.

Jen unu el la limerikoj “Duoncento da Fraŭlinoj”, kiujn Schwartz verkis:

Jen estis fraŭlino en Havro, simila al seka kadavro, ĉar pro la prestiĝo de ne-tro-dikiĝo ŝi nutris sin nur per vinagro.

Tiu limeriko ankoraŭ estas aktuala en ĉi tiu epoko de maldikigaj dietoj. Kelkaj el la aliaj estas malprudaj.

La ampleksaj rimedoj en Esperanto por vortformado donas grandan terenon por novaj ŝercoj. “*Savu mal-samideanojn!*”

3. Kulturodependa ŝercado

Ŝercoj kiuj dependas de kulturo ofte ankaŭ dependas de lingvo. Ekzemple: paroli pri lokaj eventoj, politikistoj, ktp. Preskaŭ ĉiuj ŝercoj kaj rakontoj dependas almenaŭ iomete de kulturo.

Ekzemplo de humura rakonto kiu estas kulturodependa estas “Malverdaj fingroj” de Joe Bennett. Eĉ kiam ĝi estas tradukita en Esperanton, ĉu la tuton komprenus Aziano aŭ Afrikano? Kiom oni devas ŝanĝi la rakonton por ke ne-Nov-Zelandanoj komprenu ĝin? Oni devas ŝanĝi la varnomon “Roundup” al pli ĝenerala termino “herbicido”, ŝanĝi la nomon de la televiziero “5:30 with Jude” al eble “tedajn televizierojn pri ĝardenumado” aŭ simila. Kiuj scias pri “Torkemado”? Ĉu multaj aliaj landoj eĉ havas ĝardenumajn centrojn similajn al tiuj en Nov-Zelando kaj Aŭstralio? Mi ŝanĝis “Capability Brown” al “Kapableculo”. Ĉu ekzistas pli taŭga vorto? Ĉu estas aliaj kulturodependaj eroj en la rakonto? La origina nomo de la rakonto estis “Neerg fingers”. Mi ne kuraĝis uzi neologismon kiel ekzemple “neergaj

fingroj” aŭ “drevaj fingroj” (“verd” inversigita). Mi utiligis Esperantan vortfaran rimedon kaj elektis “malverdaj fingroj” ĉar ĝi estas facile komprenebla, malgraŭ la fakto ke vi eble neniam aŭdis la terminon antaŭe! Sed eĉ tie mi devis supozi ke la koncepto “havi verdajn fingrojn” (esti lerta ĝardenumanto) estas internacia, kion mi dubas.

Nun ni konsideru la ŝercojn kiuj dependas de la kulturo de Esperantujo mem. Oni povas supozi ke aŭskultantoj kaj legantoj jam aŭdis pri Zamenhof, Raymond Schwartz, kaj aliaj eminentaj aŭ lokaj Esperantistoj. Jordan nomis ŝercojn pri tiaj homoj Angle “in-jokes”. Ĉu ni nomu ilin “samideanaj ŝercoj”? Li menciis ke oni laŭdis la verkon “Streĉ’eĉ, Steĉj-skeĉ” de Stefan MacGill ĉar ĝi postulas larĝan scion pri Esperanta kulturo. Jordan havas en la reto la propran kontribuon, rakontoj kiuj komenciĝas laŭ la tradicia komenco de tiaj fabeloj: “Antaŭ multaj jarcentoj, kiam la mondo estis juna, kaj kiam estis drakoj en Eŭropo, kaj kiam estis gigantoj en Azio...en Esperantujo...” Eĉ terminoj tutmonde konataj tra Esperantujo, ekzemple “krokodili”, kaj “kabei” suferas en tradukado same kiel ĉiuj samideanaj ŝercoj. Tamen ili ekzistas ĉar ili kuraĝigas senton de membreco al la Esperantistaro.

En Interreto mi rimarkis ĉi tiun spontanegan respondon al demando:

Alia demando de vi iras jene: diru al ni kiaj estas viaj Esperanto-fortecoj kaj Esperanto-malfortecoj. Mia forteco estas, ke mi legis la Plena Analiza Gramatiko de Esperanto skribitan de Kalocsay kaj Waringhien, de kovrilo al kovrilo [nenia ŝerco ĉi-tie], kaj mia malforteco, ke mi forgesis la plejparton de tiu ilo! :-) Leo Claude Mercier al reta

diskutogrupo GNU/LI

4. Interlingva ŝercado

Tiu speco okazas per interago de unu lingvo kun aliaj lingvoj. Ĝi ofte okazas en lingvolernado, sed ne estas tre amuza ĝenerale. Ekzemplo estas la ŝercoj de Anglalingvanoj pri la saluto: Kiel vi fartas? Ankaŭ ekzistas laŭliteraj tradukoj de nacilingvaj idiotismoj, ekzemple: li havigas al si mian kapron.

Jen unu mia kontribuo al ĉi tiu genro, vortludo kiu dependas de Angla signifo: *La suno ŝajnas brila.*

Rimedoĵoj de Esperanta humoro:

Rimedoĵoj de humoro en Esperanto estas paroladoj, libroj kaj revuoj, inkluzivante la rubrikon “Por ridigi vin”, en *Esperanto sub la Suda Kruco*, kaj ankaŭ en Interreto. Ekzemploj:

Esperanto.nu/cqi-Esperanto/
weber.ucsd.edu/~dkjordan/es/ludejo.html

www.algonet.se/~inko/retmag/
jam.html

Kiel ekzemplojn de lingvosendependaj ŝercoj Jordan citis: *Vojaĝo al Kazohinio* (Szathmari, 1958), kaj *Kredu min, sinjorino* (Rosetti, 1949).

Bibliografio

Joe Bennett 1999. “Neerg fingers” en “Sleeping dogs and other lies”, Christchurch: Hazard Press. Traduko: Donald Rogers 2001. “Malverdaj fingroj” www.geocities.com/Esperanto-nz/malverda.html

Marjorie Boulton. “La Ĵargonbesto”, www76.pair.com/keithlim/jabberwocky/translations/esperanto2.html

Montagu C Butler 1943. *Step by Step in Esperanto*, 6a eldono, London: The Esperanto Publishing Company Limited.

David K Jordan, 1988. “Esperan-

to: the International language of Humor; or, What's Funny About Esperanto?" *Humor* 1-2, 143-157.

David Richardson 1988. *Esperanto – Learning and using the International Language* Washington: Orcas Publishing Company.

Raymond Schwartz 1971 **Kun siaspeca spico** La Laguna: Stafeto.

L L Zamanhof 1954. *Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto*, 17a eldono, Rickmansworth, England: The Esperanto Publishing Company Limited.

Terminoj pri humuro en Esperanto [kun Anglaj ekvivalentoj]

humuro [angle: humour, el la malnova Franca lingvo humor] laŭ *PIV*: originala sentomaniero kaj esprimprocedo, kiu kontraŭas al la kutimaj rilatoj inter la aferoj kaj la tono, en kiu oni ilin diras, kiu prezentas la komikaĵojn kun seriozeco kaj la absurdaĵajn kun respekta soleneco, kiu provas komuniki emocijn ŝajnigante, ke oni eĉ ne scias pri ĝia ekzisto — ekzemple la humuro de Mark Twain, J K Jerome.

amuzi [amuse] agrable kaj gajige distri.

blago [jest] ŝerca mensogo.

burleska [burlesque, mock-serious] ekstravagance komika, kontrastiganta la noblecon de la temo kun la trivialeco de la stilo, aŭ inverse.

farso [slapstick], teatraĵo, kies celo estas ridigi per simplaj maldelikataj rimedoj, karikaturo gestado, krudaj ŝercoj ktp.

kalemburo [pun] vortluda mis-tranĉo.

karikaturo [cartoon] desegnaĵo,

penetraĵo, prezentanta personon aŭ objekton, kun komika aŭ satira troigo de ties karakterizaj trajtoj.

klaŭno [clown] cirka burleskulo.

komedio [comedy] ridiga teatraĵo — prezentanta komikajn personojn aŭ amuzajn eksterordinarajn cirkonstancojn.

komika [funny] ridiga, amuza (La angla vorto "funny" havas tri sencojn: 1. komika, amuza; 2. kurioza, stranga; 3. ruza, suspektinda.)

kontraŭknavo [malapropism] ŝerco, konsistanta en la inversigo de literoj aŭ silaboj inter du vortoj de frazo (ekz. "labori fiŝe kaj muse" anstataŭ "fuŝe kaj mise").

mistranĉo [mis-segmentation, pun] speco de vortludo inter du vortoj, identaj por la orelo, sed malsamaj el la vortara vidpunkto (ekz. kuraĝo kaj kur-aĝo; pie-diranto kaj piediranto) = kalemburo.

petoli [play pranks] 2. agadi ŝerce, sendisipline, senkonsidere, kontraŭ la reguloj de bonkonduco.

pintumo [] spritaĵo, pikanta per la proksimigo de du tre malsamaj ideoj.

proksimumo [play on words] speco de vortludo, en kiu la du priludataj vortoj estas nur proksimume similaj unu al la alia (ekz. Schwartz: "neniu rozo sen dorno, neniu prozo sen dor-mo!").

satiro [satire] uzo de ridindigo, parole aŭ skribe, por elmontri kaj senkuraĝigi modon, moron, hommankojn k.s.

sencoturno [ambiguity] speco de vortludo en kiu oni uzas unu saman vorton en du malsamaj signifoj.

sonalterno [sound alternation] ludo inter du vortoj, kies fonetikaj elementoj estas ĉiuj, aŭ preskaŭ ĉiuj, la

samaj, sed ne aranĝitaj en la sama ordo (ekz. “fokstrototo” kaj “koksprofoto”).

sprita [witty] 1. posedanta spiritan viglecon, kiu ebligas rapide trovi kaj originale esprimi neatenditan rilaton inter malsamaj objektoj aŭ malsamaj vortoj, ekzemple Voltero, Schwartz.

ŝerci [joke] diri aŭ fari ion, celante amuzi kaj ridigi kaj ne kun serioza intenco.

trompŝerco [practical joke] situaĉia ŝerco.

trukfilmo [cartoon film] filmo kies ĉiu filmero estas karikaturo.

vortludo [play on words] kombino de vortoj similonaj sed malsamsignifaj, per kiuj oni atingas ridigan efektan.

vorttordo [malapropism] = kontraŭ-knalo. □



POR RIDIGI VIN



En la juda vilaĝo mankis junaj viroj liberaj al geedziĝo kaj oni devis importi ilin el aliaj vilaĝoj. Unufoje edziĝonto estis atendota, sed pro eraro du estontaj bopatrinoj eliris al la stacidomo por ricevi lin. Ambaŭ kredis ke la junulo apartenas al ilia filino, kaj fine la afero atingis la tribunalon.

Kiam la juĝisto aŭdis pri kio temas, li diris: “Prenu tranĉilon kaj distranĉu la junulon. Ĉiu el vi ricevos ĝustan duonon de li.”

La unua virino diris: “Bonvolu konservi lin. Mi prefere cedu.”

Kaj la alia diris: “Bonege, distranĉu lin tuj!”

Aŭdinte tion la juĝisto diris: “Donu la junulon al la dua virino. Ŝi estas la vera bopatrino!”

[Ĉi tiu kaj la ĉi dekstra ŝercoj estas de Anat Zajdman, kaj prenitaj el la rubriko “Juda humuro”, en *Israela Esperantisto* aprilo 2001.]



POR RIDIGI VIN



Dum sia tuta vivo rabeno Jehoŝua estis tre pia kaj religiema, kaj tute nature post sia morto li eniris la ĉielon, kie li estis akceptita kun granda ĝojo. Sed anstataŭ ĝoji, li eksidis, kovris sian vizaĝon per la manoj, kaj rifuzis partopreni en la festo. La penoj de la anĝeloj konvinki lin malsukcesis, kaj fine li estis invitita antaŭ la tronon de Dio mem.

“Karulo”, aŭdis la rabeno profundan voĉon. “Estas menciite en mia listo ke vi ĉiam vivis laŭ miaj ordonoj, do kial vi rifuzas feston je via honoro?”

Rabeno Jehoŝua klinis sian kapon kaj diris: “Mi ne estas taŭga. Iel mia vivo fuŝiĝis, ĉar kvankam mi ĉiam penis subordiĝi al via Dekalogo, tamen mia filo forlasis nian religion kaj fariĝis kristano.”

“Ankaŭ la mia!” venis simpatia profundavoĉa respondo.

Kaj Ankoraŭ

“Ĉu vi parolas la anglan lingvon?”

“Nur kun vortaro.”

“Jes, ankaŭ mi — nur kun vortaro. Paroli kun homoj mi hontas...”

[El Eventoj]

Recenzas via redaktoro

James Branch Cabell: *Jurgen*. Tradukis William Auld. Jekaterinburg: Sezonoj, 2001. 239p., bind. Takso: **xxxxx**.

Unu-dufoje en la pasinteco mi legis verkon de James Branch Cabell, sed antaŭ nun ne ĉi tiun. Mi memoris lin kiel bonan verkiston, do mi kun plezuro anticipis legi *Jurgen*-on, kaj mia espero tute plenumiĝis.

Cabell vivis 1879-1958, kaj *Jurgen* unue aperis en 1919. Ĝi estas fantaziromano, sed kun speciala karaktero: ĝi estas samtempe dramigita pripensado pri la naturo de la homa vivo, kaj surpriza respondo al la ofta demando: "Se vi povus denove travivi vian vivon, ĉu vi ŝanĝus ion?"

Mi ne deziras malkaŝi la respondon trovitan en ĉi tiu romano, escepte de komenti ke tio, kion oni preferas kiam oni estas malpli juna multe diferencas de onia prefero kiam oni estas junulo.

La rolantoj en la fantaziromano estas kelkparte el la klasika mitologio, kelkparte inventitaj. Cabell havas tre bonan komprenon pri la homa psikologio, kaj min tre multe interesis la dramigita diskuto pri kial tiom da homoj emocie ebriiĝis/ebriiĝas pri Helena de Trojo, Marilyn Monroe, k.a.

Ankaŭ tre lerte solvitaj estas la tre diversaj religiaj vidpunktoj kaj ilia plenumiĝo en la nemortkapabla mondo. Kvankam filozofie profunda, la tiutema eventaro estas kaj amuza kaj pensiga. Ĉu vi scias kial la mortintoj kiuj nun troviĝas en Infero malplezurigas ĉar la demonoj malsufiĉe torturas kaj punas ilin? Kaj kion konkludi pri la plej ĉefa el ĉiuj religidroj, Koŝĉej la

Senmorta?¹ Li kreis la aferojn tiajn, kiaj ili estas, laŭraporte, sed ankaŭ kelkajojn eĉ li ne scias. Nu, kompreneble, devi prizorgi la enorman universon foruzas multan tempon, kaj...

Kiel oni povus anticipi, la traduko, farita de William Auld, estas tre facile legata kaj bonega. Kion plian diri? Malofte mi taksas romanon valora je kvin fragoj, sed ĉifoje jes ja.

Thomas A Kempis: *Ni sekvu Kriston*. Tradukis G.F. De Ruyver. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2001. 173p., broŝ.

Ĉi tiu estas religia klasikaĵo, tre bele kaj facilege tradukita. Por fido-plena Kristano, tre edifa pia libro.

Brazila Esperantisto: kvaronjara revuo de Brazila Esperanto-Ligo. Takso: **xxxx**.

Ĉu vi kredus? Nuntempe, ĉi tiu estas la plej bela, kaj inter la plej bone redaktataj gazetoj, en la Esperanta mondo. Ĉiu numero havas 32 paĝojn grandformatajn, kun abundaj koloraj fotoj, kiel ankaŭ nigra-blankaj. La papero estas tre altkvalita, kaj la redaktado estas profesinivela. La sekreto? Nu, la Brazila Ligo havis 1450 membrojn en 2000 (kreskinte de nur 523 en 1998!). Komparu kun tio la Aŭstralian membraron: 190 en 2000, kaj la Nov-Zelandon: 60 personoj.

Rilate al enhavo: kompreneble *Brazila Esperantisto* havas ĉefe tekstojn pri Brazilo — ili interesas, ĉar

¹ Tre grava mitologia ulo en la Rusa fabelaro.

en 2002 la Universala Kongreso de Esperanto okazos en la Brazila urbo Fortaleza.

Ralph Harry: *Adventures in Esperantoland*. Redfern NSW, Australian Esperanto Association, 2001. 132p. + 4 paĝoj da fotoj, broŝ.

Ĉi tiu estas la originala Anglalingva teksto de la verko *Aventuroj en Es-*

perantujo (1994), kun kelkaj partoj ĝisdatigitaj. Temas pri la Esperanto-spertoj de Ralph Harry, inkluzive kelkajn el lia profesia kariero kiel Ambasadoro de Aŭstralio en diversaj landoj. Tre leginda donaco por viaj amikoj, aŭ por komencantoj kiuj deziras distre informiĝi pri Esperanto en la moderna mondo. □

MALLONGA SUPERRIGARDO DE LA INTERNACIA PATENT-SISTEMO

de Roland Rotsaert

Jam de pluraj jaroj Eŭropa Unio klopodas krei “Eŭropan patenton”.

Difino de patento

Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro (1974) donas jenan difinon: “La ekskluziva rajto (monopolo), apliki inventon de nova produkto aŭ nova procedo, aŭ apliki novan plibonigon de produkto aŭ procedo”.

Intelektaj rajtoj

Patentoj estas nur unu grupo el la t.n. “intelektaj kaj industriaj propretoj”. Aliaj estas komercaj nomoj, markoj, desegnaĵoj, modeloj, plantrajtoj kaj kopirajtoj. Ĉiuj tiaj rajtoj havas sian propran landan leĝaron, plimalpli internacie kunordigitan. Pri la registrado de tiuj rajtoj en ĉiuj landoj kompetentas malsamaj instancoj. Nur kelkloke unu sola instanco respondecas pri ĉiuj registraĵoj de kaj ĉiuj informoj pri ĉiuj entreprenoj (ekzemple la Sveda Patentkaj Registradoficejo).

Kun Interreto venis novaj protektendaj rajtoj: la “domain”-nomoj, la kopirajto de tekstoj, bildoj, muziko... cirkulantaj interrete.

Kial patento estas bezonata?

Inventisto (ĉu individua persono, ĉu esploristo[j] en entrepreno) kutime investis multon por ellabori novan procedon kaj deziras iel profitigi la investon. Per patento li ricevas ekskluzivan rajton por ekspluati sian inventon dum limigita periodo (ĝenerale 10 ĝis 20 jaroj). Patento nur validas en unu lando. Se protekto en alia lando estas dezirata, necesas plenumi la formalizaĵojn ankaŭ en tiu lando.

Inventisto ne nepre devas ekspluati la inventon protektitan per patento. Eblas transdoni la rajton (per vendo aŭ licenco) al alia persono aŭ entrepreno kiu havas pli da kapabloj por profitdome uzi ĝin.

Estas neniu devo protekti inventon per patento. Inventinto rajtas simple uzi la inventaĵon en sia entrepreno, esperante ke neniu rivalo ekscios pri ĝi (kaj eble mem protektos la saman procedon). Tiel li ŝparas la kostojn de la proceduro.

Ankaŭ eblas ke inventinto libervole publikigas la rezulton de siaj esploroj kaj tiel igas ĝin nepatentebla. Imageblas diversaj kialoj por tia mal-

avareco kiu donas al ĉiuj la rajton uzi la inventon:

- memfido de la inventinto ke li, estante unua kaj havante la plej grandan sperton, rapide akaparos konsiderindan parton de nove kreita merkato (la persona komputilo de IBM, 1980);
- la deziro utili al la socio (la lingvo Esperanto, la komputila mastruma sistemo Linux).

Originoj de la patent-proceduro

La plej malnovan patentan leĝon kiun mi trovis estas el 1641 kaj rilatas al produktado de salo en Massachusetts (Usono). Tamen, tio verŝajne ne koncernis inventon laŭ la nuna koncepto, sed — kiel tiutempe okazis en Eŭropo — la ekskluzivan rajton ekspluati konatan procedon en iu regiono.

La “modernaj” patentreguloj alvenis kun la industria revolucio en la 19a jarcento (kreo de la Usona patentoficejo, 1836; unua leĝo en Nederlando 1817, en Belgio 1854). Ankaŭ estis la epoko de la mondaj ekspozicioj: la unua okazis en Londono en 1851. Samtempe kun la monda ekspozicio en Vieno (1873) okazis internacia kongreso pri patentoj.

Ekestis bezono je internacia regularo. Unua estis la Konvencio de Parizo (1883). Poste sekvis multaj novaj kaj kompletigaj internaciaj traktatoj.

Dum la pasintaj jardekoj ĉiuj landoj adaptis sian patentregularon al internaciiginta ekonomia situacio. En la iamaj komunismaj landoj ekzistis tute alia sistemo. Ĉinio kiel unua lando de tiu grupo kreis modernan patentregularon kaj serĉsistemon el-laboritan kun helpo de Franca entrepreno Questel-Orbit. Multaj oriente-eŭropaj landoj baldaŭ aliĝos al

Eŭropa Patent-Organizaĵo (aŭ eble tuj al nova Eŭropunia organizaĵo, se tiu rapide establiĝos).

La Eŭropa situacio

Por kompreni la nunan Eŭropan sistemon (Eŭropa Patent-Oficejo en München, Germanio, kun filioj en Den Haag/Rijswijk, Nederlando kaj Vieno, Aŭstrio) necesas iom reiri en la historio.

Post la dua mondmilito sentiĝis bezono je internacia informcentro pri patentoj. Decido pri adjudiko por realigi tion okazis nur en 1965.

Adjudikantoj estas la Respubliko Aŭstrio, Institut International des Brevets (IIB) el Nederlando kaj Derwent, privata Brita kompanio. La taskon ricevis Aŭstrio, kiu kreis por tio komercan entreprenon, nuntempe konatan kiel INPADOC.

En 1973 Eŭropa Patent-Organizaĵo (EPO) estis kreita kun sidejo en München, Germanio (urbo kie ankaŭ estas la sidejo de la germana patentoficejo). Ĝi ne estas instanco de Eŭropa Unio (kvankam EU-membroŝtatoj estis inter la fondintoj kaj EU influas la mastrumadon).

Celo estis plifaciligi kaj unuecigi la registradon de patentoj. Eblas registri per ĝi patentojn en ĉiuj aliĝintaj ŝtatoj indikitaj de la patentpetanto. En 1999 estis 19 aliĝintoj kaj en 2002 aldoniĝos 8 orienteŭropaj landoj. Pluraj aliaj sekvos.

En 1988-1992 INPADOC integriĝis en EPO kaj nun, ankoraŭ en Vieno, funkcias kiel inform- kaj edukcentro de EPO. Nederlanda IIB ricevis — en cirkonstancoj kiujn mi ne retrovis — la taskon esplori la novecon de patentpetoj kiuj alvenas ĉe EPO.

Jam en 1975 Traktato de Luksemburgo kreis la bazon de Eŭropunia patento, kiu aŭtomate validos en tuta

Eŭropa Unio. Tamen, la efektivigo de tiu projekto ankoraŭ daŭras. Lastatempe estas forta premo por disponi pri EU-patento kaj la preparo de la necesa regularo estas nun en fina fazo.

Helpantoj de patentpetanto necesas

Kvankam teorie eblas ke inventisto mem vizitas la landan patentoficejon, praktike estas bezonata granda sperto por sukcese plenumi la necesajn formalizaĵojn. Grandaj entreprenoj havas sian propran sekcion kiu okupiĝas pri tio. Malgrandaj entreprenoj aŭ individuoj devas konsulti specialiston (patentagentejon) por kontroli ĉu la invento vere estas nova, por verki kaj traduki la informojn pri la inventoj en taŭga formo, por konsiliĝi pri la landoj kie registrado estas plej oportuna, ktp.

Agentejoj estas troveblaj en telefonlibro. Ofte la landaj patentoficejoj disponigas liston de oficiale rekonitaj agentejoj. Ne estas unueca nomo por tiu profesio. Kelkaj ekzemploj: mandataire agr, conseil en brevet (France); patent attorney, authorized representative (Angle); Patentanwalt, zugelassener Vertreter (Germane); octrooigemachtigde (Nederlande).

Ankaŭ agentejoj kaj grandaj entreprenoj ne mem ĉion faras. Kelkaj specialigitaj privataj entreprenoj (Derwent, Questel Orbit...) kreis grandegajn, facile traserĉeblajn datumbazojn kies enhavon ili metas — kontraŭ pago — je dispono de intereseitoj.

Ankaŭ ekzistas specialaj foiroj dum kiuj la specialistoj ofertas siajn servojn, ekzemple:

- INPEX, Pittsburgh, Usono, 16-20 majo 2001 (www.inventionshow.com)

- 3IPS (Ideas, Innovation and Intellectual Property Services), Leuven, Belgio, 9-11 oktobro 2001 (www.3ips.com)

Nur per Interreto funkcias la Pariza www.laboursedesinventions.com.

Kostoj de akiro kaj uzo de patento

Estas multaj elementoj en la kosto-kalkulo de patento. Dependas i.a. de la dezirata periodo de valideco kaj de la kvanto da landoj en kiuj protekto estas bezonata. Prezkomparo aperis en *Monato* 11/2000, sed cirkulas multaj similaj (foje kontraŭdiraj) tabeloj. Raportisto emas elekti la tabelon kiu estas plej konvena al lia hipotezo. Estas klare ke patento kostas malpli en granda, unulingva lando kiel Usono aŭ Japanio, dum en aro da malgrandaj, diverslingvaj landoj kiel en Eŭropo la kostoj estas pli grandaj.

EPO dum la pasintaj jaroj jam plurfoje malaltigis siajn tarifon. Krome ĉiuj patentoficejoj aperigas la novajn patentinformojn tra Interreto.

La informoj pri malnovaj patentoj en rapida ritmo aldoniĝos. Tiel inventanto kun minimuma sperto kapablas fari supraĵan esploron pri la noveco de sia invento kaj tiel eviti nenecesajn kostojn. En la ĉijara PATINNOVA/EPIDOS-konferenco EPO prezentos programaron kiu gvidas la patentpetanton tra la proceduro.

Necesaj tradukoj por akiri patenton kaj ties kostoj

En multlingva Eŭropo la tradukokostoj estas tikla afero. La laborlingvoj de EPO estas Angla, Franca kaj Germana. Por la nuna Eŭropa patento necesas prezenti la dosieron en unu el tiuj tri lingvoj kaj (parte) traduki ĝin en la lingvon de la landoj kie la patento validu.

Ekzistas nesolvebla konflikto inter la oficiala starpunkto de Eŭropa Unio, laŭ kiu ĉiuj lingvoj estas egalrajtaj, kaj la praktiko, laŭ kiu la Angla estas la kutima lingvo por patentaferoj. Se la Eŭropa Parlamento sekvos la oficialan starpunkton, necesos traduki la dosieron de estonta Eŭropa patento en ĉiujn lingvojn de EU (baldaŭ proksimume 25). Praktike tamen, por esploroj oni nur uzas la Anglan version.

La konflikto estis sentebla en la PATINNOVA-intervenoj. Reprezentantoj de la Eŭropa Komisiono diskrete subtenis la egalrajtecon de ĉiuj lingvoj. Reprezentantoj de la industrio volis nur la Anglan. Hispana membro de la Eŭropa Parlamento, s-ino Ana Palacio Vallelersundi, kontraŭis uzon de nura Angla lingvo.

Oni eble trovos la solvon en jam ekzistanta proceduro. Por plifaciligi la serĉadon la patentoficejoj jam de longe uzas klasifikajn sistemojn (IPC, EPC), kompareblajn kun naci-klasifikoj por profesioj aŭ decimala klasifiko en bibliotekoj. Ekzemplo el IPC:

B Transporto

B64C Aviadilo

B64C25 Alteriĝa sistemo

Aldono de unu aŭ pluraj tiaj kodoj okaze de registrado de patentoj ebligas poste rapidan retrovon de tiu aŭ similaj patentoj. Traduko de la patentdosiero al nur la Angla (se ĝi origine ne estas en la Angla) kaj disponigo de la klasifiko ("keywords", ŝlosilvortoj) en ĉiuj lingvoj ebligas rapidan retrovon de la bezonataj informoj je modera kosto.

Klasikaj kaj interretaj patentejoj kiel riĉa informfonto por interesitaj aplikemuloj

Konsekvenco de atribuo de patento estas ke la detala priskribo de la

invento iĝas publika posedaĵo. Resumoj de patentpriskriboj jam ĉiam aperis en specialigitaj revuoj kaj nun ankaŭ interrete. Por entrepreno kiu serĉas iun novan produktoprocedon estas interese serĉi ĉu eble jam ekzistas patento pri tio. Se ĝi trovas utilan patenton, ĝi povas akiri de la patentulo licencon; tio verŝajne kostos multe malpli ol mem ellabori novan procedon. Post periodo 10 ĝis 20 jaroj la patento perdas sian validecon kaj ĉiu ajn povas libere apliki la inventon aŭ procedon.

En sciencaj medioj oni ne sufiĉe konscias pri ekzisto de patentoj.

Sufiĉe granda parto de la inventoj tute ne estas novaj, sed jam estas faritaj antaŭe. Eblus ŝpari penon kaj plirapidigi la teknikan progreson per pli bona esplorado de la patentaj datumbazoj. Kelkaj citaĵoj el PATINNOVA:

- 70% de la teknika scio troveblas en patentoj;
- 70% de ĉiuj novigaj esploroj estas pluoble farataj;
- 20% de ĉiuj rezultoj de esploroj jam antaŭe estis publikigitaj.

Interreto kaŭzis revolucion en la patenta mondo. Baldaŭ ĉiuj patentinformoj de la tuta mondo estos — almenaŭ resume — senpage konsulteblaj per Interreto. Antaŭ jardeko tio estis tute neimagebla.

Tio tamen ne signifas ke agentejoj kaj prizorgantoj de specialigitaj datumbazoj iĝos senlaboraj. Kiel ĉiu uzanto de Interreto scias, sperta uzanto multe pli rapide trovas multe pli uzeblajn informojn. La privataj, specialigitaj datumbazoj havas pli efikajn serĉsistemojn ol la relative simplaj datumbazoj kiujn la oficialaj patentoficejoj disponigas al la publiko.

Konfliktoj pro senrajta patentuzo

Kion faru patentulo kiam li konstatas ke, malgraŭ la protekto de patento, iu konkuranto tamen aplikas la patentitan procedon sen aĉeti la patenton aŭ pagi por akiri licencon? Triono de la prelegoj de la 1999a konferenco rilatis al tiaj konfliktoj. Por malgrandaj entreprenoj oni proponis asekuron kiu kovru la jurajn kostojn por respektigi la patentprotekon. Oni debatis pri eblaj specialaj juĝejoj por patentaferoj. Iuj favoras

arbitracion.

[El *La Merkato* n-ro 73, julio 2001,
per *RetInfo*] ☐

Korekto

En nia juli-aŭgusta numero, la antaŭlasta linio sur paĝo 7, en la rubriko “Por ridigi vin” estis nelegebla. La teksto celis esti: “Jes, multe malpli severe ol tiujn kiuj mortigas!”

Ni pardonpetas al niaj legantoj. ☐

DIVERSAĴOJ

OSIEK-premio 2000 por Trevor Steele

La premio de OSIEK ĉi jare estis aljuĝita al Trevor Steele pro originala Esperanto-verko *Falantaj muroj*. En 2000 estis kandidatigitaj 18 verkoj, el kiu sekreta voĉdonado de OSIEK-anoj elektis la gajnintan. [Laŭ *Ret-info*]

3ZZZ

Informis Svetislav Kanaĉki

La Esperanto-programo de radio 3ZZZ kompletigis sian 13an jaron en julio, kaj la 9an de oktobro kompletigos 8 jarojn da disaŭdigado per Satelito ComRadSat de Sidnejo.

Nun Radio 3ZZZ ankaŭ aŭskulteblas per la Reto ĉe la adreso:
www.3zzz.com.au

Provizore oni povas aŭskulti la Esperantan programon je 3.00 ĝis 4.00 UTC; sed post la kompleta instaligo de la sistemo, ĝi estos aŭskultebla kiam ajn.

Ĝis nun la programoj estis faritaj por aŭskultantoj en Aŭstralio, kun informoj eleksterlandaj. Nun necesas prepari programojn taŭgajn kaj por Aŭstralio kaj por la cetera mondo.

Por tio, estas bezonataj pli da kunlaborantoj. Sonbendoj kun viaj voĉo kaj nomo estos bonvenaj, la temoj povas esti laŭ via deziro. Sendu al Svetislav Kanaĉki, 72 Jubilee Street, Mt Waverley Vic 3149, Aŭstralio.

Ni Gratulas

Je la 6a de julio naskiĝis filino en Hospitalo Katoomba por Gepatroj Ĝo kaj Alan Turvey. Ŝia nomo estas Karina. Karina estas la unua fratino por Erik, kaj la unua nepino por Edna kaj Fred. La pezo je naskiĝo estis 3.075 kg. Kaj panjo kaj filino estas bonsanaj. La patrino de Ĝo ekalvenis de Koreo por vidi sian novan nepinon kaj por helpi en la domo. Ĝo komentis ke la dato la 7a tago de la 7a monato estas tre bonfortuna kaj la bebo alvenis nur 3 horojn antaŭ tiu dato.

[Laŭ *Telopeo*]



**POR RIDIGI
VIN**



“Dum teruriga tondrado, la tondro subite falis en mian ĉambron kaj cindrigis mian fratinton...”

“Kaj kion vi faris?”

“Mi sonorigis al la ĉambristino kaj diris al ŝi: ‘Heleno, elbalau la fraŭlinon!’” [el *Ĉaŭ*]



Skribas la Legantoj



Skribas Rudolf Koppel:

Ŝatante vian Esperanto-laboron kun kiu mi ekkonatiĝis danke al mia sanktmemora Esperanto-amiko Herberto¹ — mi salutas vin el malproksima Germanio.

Mi ĝojas ke mi povas partopreni en viaj Esperanto-agadoj anime pere via bulteno. En la lasta numero mi trovis retadreson <http://www.curso.deEsperanto.com.br> de Esperanto-kurso, kiun mi volis trastudi. Mi faris la kompletan elŝuton de tiu datao (5,01 MB) kaj konstatis ke en ĝi troviĝas nekonata viruso. Feliĉe mi ne malfermis ĝin. Bonvolu informi pri tiu la aŭtorojn kaj avertu pli tiu danĝero la uzantojn.

Skribas Hazel Green:

Dankon pro via malavara donaco de la libro *Malvivaj animoj* kiel premio enletertraduka konkurso. Mi certe ne legis ĝin antaŭe, kaj interesiĝas pri la serio “oriento-okcidento”.

Tamen, tre embarasus min akcepti ĝin, ĉar mi neniam tradukis la leteron, do neniam faris ion ajn por meriti premion.

Mi supozas ke:

a) iu tradukis, metis mian nomon ĉar mi skribis la Anglan, kaj forgesis aldoni sian propran nomon.

aŭ b) iu intence sendis tradukon anonime.

aŭ c) vi intermiksitis nomojn pro tro da laboro (ni rimarkis multajn viajn bonajn recenzojn en “Monato”)

Mi eĉ pensis pri ĉe — ĉar mi tiom ŝatas tradukadon (mi ŝercas!) eble mi faris la tradukon senkonscie. Sed kontrolo de ĉiu dokumento en mia komputilo montris ke ne.

Mi konfesas ke mi jam komencis legi la libron, sed kun zorgo ke ĝi restu pura por la vera gajninto.

Via konfuzita amiko, Hazel

P.S. Unu indikilo ke la venkanta tradukaĵo ne estas mia, estas ke mi preskaŭ ĉiam forgesas pri iu gramatika eraro. Do bonvolu redakti ĉi tiun leteron se vi uzos ĝin en *ESK*.

[Noto de la redaktoro: mi bezonis fari tute neniun korekton en la ĉi-supra letero. Ne tiom modestu, Hazel!]

Efektive, mi ja misskribis la nomon de la kontribuinto de la plej bona traduko: Franciska Toubale, al kiu mi elkore pardonpetas. (Kaj al kiu mi sendis premion, kiun ŝi elektis el listo kiun mi disponigis.) □

Skribas Ken Rolls:

Estimata Don,

Mi tre dankas vin por la kompakta disko, de la Oka Aldono, kion mi vere ricevis. Pardonu min, pri mia malrapida respondo, sed mi havis iom da malfacileco, kiam mi penis legi ĝin. Sed mi lernadas. Nun, mi povas legi. Mi ne estas spertulo pri komputiloj.



Parolante pri komputiloj, vi demandis, en la lasta *ESK*: “Kiun genron havas komputilo?” Fruaj komputiloj estis inaj. Nunaj komputiloj estas viraj. Fruaj komputiloj havis ĝemelajn molaĵojn (twin floppies) kaj nunaj komputiloj havas malmolan veturigon (hard drive). □

¹ Herbert Koppel, antaŭnelonge mortinta ĉefo de la Libroservo de Aŭstralia Esperanto-Asocio. — Red.



Laŭ mia vidpunkto



Kalle Kniivalä

Ĉu la dua lingvo por ĉiuj?

Iam oni argumentas ke ĉiu homo en la mondo bezonas scii nur du lingvojn: la nacian lingvon por lokaj bezonoj kaj Esperanton por internacia uzo. Sed en la reale ekzistanta mondo tiu argumento estas falsa, ĉar ĝi neglektas la faktojn.

Fakto estas ke tre granda parto de la monda loĝantaro devas lerni fremdan lingvon jam por komuniki kun la lokaj aŭtoritatoj. Kelkaj ĉar ili parolas minoritatan lingvon, aliaj ĉar la aŭtoritatoj pro tiu aŭ alia kialo preferas ne uzi la lokan lingvon, kaj triaj ĉar ili mem ŝanĝis loĝlokon de unu lingvoregiono al alia. Apenaŭ estas klare kiel rolu ĉies dua lingvo en tia situacion.

Fakto estas ankaŭ ke tre granda parto de la monda loĝantaro jam havas regulajn internaciajn kontaktojn sen uzi Esperanton, kaj tute ne sentas la bezonon lerni unu plian lingvon. Sed al multaj Esperantistoj malplaĉas ke por internaciaj kontaktoj oni uzas malĝustajn lingvojn, kvazaŭ pli gravus la lingvo ol la kontakto kiun ĝi peras. Kaj anstataŭ montri al homoj kion plian ili povus ricevi per Esperanto, iuj dediĉas sian energion al Sizifa¹ batalo kontraŭ la potenco de la Angla lingvo.

Fakto estas krome ke inter la Esperantistoj la plej multaj konas kaj uzas plurajn lingvojn, ne nur sian de-

naskan kaj Esperanton. Kaj evidente la Esperantistoj bezonas sian lingvon ne por mendi bieron en fremda lando, eĉ se ankaŭ tio povas foje funkcii, sed por kontaktoj pli profundaj ol donas ordinara lingvoscio. Kial do propagandi por internacia *helplingvo*, kiam estas evidente ke helplingvo estas la Angla, dum Esperanto estas multe pli?

Post du jaroj ni kongresos en Gotenburgo. Junie en la sama kongresujo kolektiĝis la ŝtatestroj de Eŭropa Unio. Ekster la ejo pace manifestaciis dekmiloj da homoj por esprimi siajn dubojn pri la ekzistanta ordo. Sed la atenton de la mondo kaptis aro da alveturintaj huliganoj, kiuj uzis la pintkunvenon kiel pretekston por eligi sian agresemon kaj detrui ĉion rompeblan ĉirkaŭe.

Ni ne estu kiel la huliganoj en Gotenburgo, kiuj deziris unue detrui la tutan ekzistantan ordon, kaj nur poste elpensi kion konstrui en ĝia loko. Per sovaĝaj atakoj kaj krudaj sloganoj oni eble povas atingi momenton de la publika atento, sed apenaŭ multon plian. La mondo vere aŭskultos nin nur se ni havos ion valoran por diri.

Ni do ne desupre ordonu al la mondo simplisman ĝeneralan solvon de ĉiuj mondaj lingvaj problemoj, solvon al kiu ni apenaŭ mem povas firme kredi. Prefere ni montru kion efektive eblas fari per Esperanto, kaj lasu ĉiun mem decidi por kio ĝi utilas.

Esperanto estas la lingvo de la libereco. Ni lasu ĝin esti tia kia ĝi estas.

¹ Aludo al antikva Greka mito, laŭ kiu pune pro pekado, Sizifo devis konstante ruli supren rokegon kiu ĉiufoje reruliĝis malsupren, tiel ke lia penado estis senfina. — Red.



Deziras korespondi



LUÍS SOLDEVILA MOMINÓ, Camí La Torre - xalet, 08610 Avià, Hispanio: Mi estas Hispano, maljuna homo, 68jara; mi iom konas la internacian lingvon Esperanto, do min interesas povi korespondi kun samidean(in)o

en via lontana lando Nov-Zelando, skribi pri diversaj temoj, kaj interŝanĝi poŝtkartojn. La parto de Hispanio kie mi loĝas estas Katalunio, kies ĉefurbo estas Barcelono.

APELACIO AL LA KONSCIENCO DE LA HOMARO

De Dachau al la homaj rajtoj — duobla datreveno

Vide de la tutmondaj festoj okaze de la kvindeka datreveno de la proklamado de la ĉarto de la homaj rajtoj, necesas memori pri la terura prezo kiun pagis la kontraŭuloj de la Hitlera diktaturo, ĉar ili aŭdacis defendi la homan rajton je libera opini-esprimado, eĉ antaŭ ol ekzistis ĉarto.

En la konscio de la tuta mondo, la nomo Auschwitz fariĝis monstre granda terura simbolo por la strebado de la nazia regno komplete estingi homgrupon nur pro ĝiaj ekzisto kaj malsameco.

Oni ne faru la eraron, per tiu terura nocio komplete kovri alian same tragikan kaj same kriman nocion, kiun reprezentas la Koncentrejo Dachau. La nomo Dachau estas same kovrita per honto.

Ĉar en Dachau jam en la jaro 1933, do sep jarojn antaŭ la starigo de Auschwitz, laŭ ordono de Hitler estis malfermita la unua koncentrejo. Dachau fariĝis modelo, el kiu fontis ĉiuj samcelaj institucioj: Birkenau, Breendonck, Buchenwald, Dora-Mittelbau, Mauthausen, Natzweiler-Struthof, Neuengamme, Qranien-

burg-Sachsenhausen, Ravensbrück, Treblinka — la nomaro estas kvazaŭ senfina.

Marte de 1933 Hitler estis elektita regna kanceliero per 52% de la donitaj voĉoj, el kiuj 44% venis de la NSDAP kaj 8% de la konservativuloj. Li tuj komencis efektiviĝi sian unuan projekton, la neniigon de ĉiuj kontraŭuloj kaj la likvidadon de ĉiuj liberaj spiritoj, eĉ de ĉiu penso kiu ne submetiĝis al la gvidantula principo.

Tiel antaŭ 65 jaroj Dachau estis malfermita, por likvidi ĉiujn kontraŭulojn de la nazioj: Klerikojn, komunistojn, socialistojn, liberpensulojn de ĉiuj specoj kaj subspecoj, inter ili agnostikulojn, katolikojn, protestantojn kaj judojn, kiujn unuigis la volo je libero.

Ĉe tio ĉi la raso ankoraŭ ne ludis rolon, nur nepardonebla malobeo kaj la decido por libereco de pensoj kaj opinioj.

La realigo de la dua nazia celo, la murdado de homgrupoj deklaritaj “malpli valoraj”, judoj kaj ciganoj, kompletigis la hororan, senprecedentan, frenezan planon de la naziaj

murdistoj.

Nek tiu ĉi nek tiu hontmakulo rajtas esti forviŝita el la memoro de la homaro. Male, minacas ripeto...

La postvivintoj de la unua nazia koncentrejo en Dachau:

- emfaze bonvenigas la Deklaracion de la Homaj Rajtoj;
- petegas ĉiun homojn meritant-

ajn tiun nomon, senrestrikte garantiĝian validecon;

- alvokas la junularon de ĉiuj landoj, ĉiaj deveno kaj mondkoncepto, sekurigi ĝian pluekziston.

Fotoj kaj priskriboj en Esperanto troveblas ĉe la interreta sito:

<http://www.forst.tu-muenchen.de/~refo/kzg-dachau/> □



INTERRETE



• **Novaj e-poŝtaj adresoj:**

Bob Felby: <esperantobob@dingoblue.net.au>

• **Supersigno:** Uzantoj de Windows devus konscii ke ili povas havigi al si *senpage* la ĝisdatigitan programon SUPERSIGNO, kiu ebligas tajpi la Esperantajn literojn senĝene en ĉiu ajn por-Windows programo (e-poŝto, tekstoprilaboriloj, kc.). Ĝi utiligas la UNIKODAJN kapablojn de la alfabetoj aŭtomate instalitaj en Windows. Por akiri la programon, vi povas iri al www.esperanto.org.au. La programo SUPERSIGNO ebligas diversajn metodojn fari la Esperantajn literojn, laŭ la prefero de la uzanto. La programo enhavas, en Esperanto, facilajn kaj facile plenumoblajn instrukciojn. Via redaktoro provis ĝin, kaj trovas ĝin kaj facila kaj tre kontentiga.

• **Macintosh-antoj:** Por uzantoj de la nova OS X via redaktoro tre rekomendas la senpagan e-poŝtan programon kiu aŭtomate instaliĝas kiel parto de OS X kaj havas la simplegan

nomon "Mail". Ĝi bonege utiligas UNIKODON, kaj por skribo, kaj por lego. La senpaga retlegilo OMNIWEB, ankaŭ por OS X, bone legigas UNIKODAJN rettekstojn.

La retlegprogramo *Mozilla*, por OS X, estas ankaŭ tre stabila kaj uzinda. Ĝi bone utiligas UNIKODON, estas senpaga, kaj bone rivalas OMNIWEB-ON. Serĉante ĝin, notu ke la OS-X-an version de MOZILLA oni ofte nomas *Fizzilla*, por distingi ĝin de la versio por OS 9.1.)

• **La bulteno *eurofax*** de la internacia skoltaro nuntempe publikiĝas ankaŭ en Esperanto. Ĝi estas legebla ĉe <www.scout.org/europe/eurofax>, kaj oni povas ankaŭ liverigi ĝin al si per e-poŝto se oni deziras.

• **Se vi uzas la retserĉilon Google**, ĝi nun estas konsultebla en Esperanto. Ĉe la retadreso <http://www.google.com>, elektu "preferences" kaj ĉe ili Esperanto.

• **Monato** estas eldonata ne nur en

formo de papera magazino, sed ekde nun ties tekstoj estas sendataj ankaŭ Rete al petantoj. La tekstoj estas sendataj al la abonantoj regule tra la tuta monato kaj ne unufoje monate kiel en la magazina versio.

Provizore la reta versio de *Monato* estas senkosta, ĉar la funkciado estas ankoraŭ testata. Verŝajne ekde la unua de januaro 2002 la servo iĝos pagenda.

Versioj: Ekzistas du retaj versioj: la askia versio kaj la UNIKODA versio. La askia versio estas legebla per la plej bazaj tekstiloj de ĉiuj komputiloj kaj sen bezono de iuj apartaj tiparoj. Ĝi uzas la tiel nomatan x-surogaton (ehxosxango cxiujxauxde). La unikoda versio uzas la XHTML-normon kaj povas esti legata per modernaj kroziloj kiel Netscape aŭ Internet Explorer kaj per poŝtiloj kiel Outlook Express.

Aliĝi: Por aliĝi al la askia versio vi sendu retmesaĝon al servilo@fel.esperanto.be kaj skribu en la temlinio la jenajn du vortojn: subscribe monato-x.

Por aliĝi al la UNIKODA versio sendu retmesaĝon al servilo@fel.esperanto.be kaj skribu en la temlinio la jenajn du vortojn: subscribe monato-xhtml.

Oni rajtas aliĝi al la du versioj, sed tiam oni ja ricevas ĉiujn tekstojn duoble ...

• **Esperanto-gazetoj legeblaj per Interreto:** *Kiel preskaŭ ĉio Esperanta en Interreto, entuziasmo abundas sed fervoro rapidege malaperas. El longa listo de Esperanto-periodaĵoj en Interreto trovebla en la Virtuala Esperanto-Biblioteko, nur la sekvantaj estis efektive troveblaj kaj ĝisdataj, kiam via redaktoro serĉis je*

la 26a de julio - 2 Aŭgusto:

Berlina informilo: Takso: xxx. De la Esperanto-Ligo Berlino. Ĉi tiu informilo aperas ĉiumonate, ekde novembro 1997, kaj estas regule aktualigata. La tekstoj legeblas per UNIKODO. La informoj estas lokaj, abundaj, bone verkitaj kaj kun tre bona lingvaĵo. Kion ajn vi volas trovi pri Esperanto en la Berlina regiono, tion vi trovas ĉi tie. Retadreso:

<http://www.esperanto.de/org/lv.berlin/informilo>

Ĉaŭ: Takso: xxxxx. Redaktata de Franko Luin, en Svedio. Tre bele preparata periodaĵo uzanta UNIKODON, kun bonaspektaj koloraj desegnaĵoj kaj belaj "paĝoj". Ĉi tiu gazeto merit- as tralegon; domage, ĝi estas malofte ĝisdatigata, tiel ke la enhavo restas neŝanĝita ofte monaton post monato.

En la teksto kiun mi legis fine de julio, mi trovis artikolon "La beba mondo" en kiu estas aro da utilaj vortoj, kun difinoj, pri objektoj uzataj kiam oni prizorgas bebon; en "Ĉu vi jam aŭdis ĝin?" estas arto da ŝercoj bongustaj kaj iom amuzaj;

"Eta mi" estas kolekto da nelongaj anekdotoj, plejparte pri spertoj Esperantistaj;

"La kamela nazo" diskutas la naturon de la nazoj de kameloj;

"Ni naturpromenas" estas pri floroj; "La printempo" diskutas la karakterizaĵojn de la printempo;

"Privata kantaro" donas la tekstojn de 12 kantoj/poemoj tradukitaj de Franko Luin mem;

"Supersignoj kaj ĉapeloj" diskutas la nomojn de niaj supersignoj ^ kaj ~; kaj, laste,

Sur la spicobreto" listigas kun priskriboj kaj interesaj detaloj aron da spicoj kutime uzataj en kuirado.

Krome, ĉ. 100 Esperanto-tiparoj por utiligado fare de Macintosh-komputiloj disponiĝas al la legantoj. — Do tre bunta kaj interesa retrevuo.

Retadreso:

<http://www.algonet.se/~inko/retmag/>

Elektronika bulteno de la Esperanto-Asocio de Sankta-Luiso [en Usono]: Takso: **xx**. Legebla kaj per UNIKODO kaj per la x-sistemo. Domaĝe, la UNIKOD-igo estas tre malerte farita. Temas pri regiona bulteneto, kun mallongaj artikoloj, el kiuj pluraj estas tre legindaj. Monate aperigata per Interreto, ekde majo 1999. Retadreso: <http://www.angelfire.com/mo2/bulteno/>

El popola Ĉinio: nun legebla nur per Interreto. Takso: **xxxx**. Domaĝe, la ret-ligo al ĉi tiu periodaĵo estas erare donita en la listo ĉe Virtuala Esperanto-Biblioteko. Do uzu la retadreson donitan ĉimalsupre. Ĉi tiu gazeto estas, kiel sendube scias niaj legantoj, unu el la plej prestiĝaj en la lingvo Esperanto. La reteldono uzas la h-sistemon.

Retadreso: <http://www.china.org.cn/english/index.htm> (sur la supro de la paĝo troviĝas butono por Esperanto).

Esperanto sub la Suda Kruco: ĉiuj numeroj ekde januaro 1993 troveblas ĉe la retadreso:

www.esperanto.org.au/esk

Nun: Takso: **xxxxx**. Tre mallongaj artikoloj pri aktualaj Esperanto-eventoj. Konstante ĝisdatigata. Uzas UNIKODON. Retadreso:

<http://www.esperanto.se/nun/>

[Esperanto en Azio:] Veturraporto el Azio, de persono nenomita. Pluraj interesaj fotoj pri Japanio; multaj fotoj kaj impresoj pri la Adelajda UK. Ankaŭ impresoj (nur Japanlingvaj)

kaj fotoj pri aliaj UK-oj. Takso: **xxx**. Retadreso: <http://www.asahi-net.or.jp/~wh4kbnb/>

Espero katolika: Takso: **xxxx**. Elektitaj artikoloj el numeroj ekde numeroj de 1994. Uzas la x-sistemon. Retadreso: <http://go.to/ikue>

Kva! Kvak! Takso: **xx**. Bulteno de la Stokholma Esperanto-societo La Ranetoj. Negranda klubbulteno. Uzas UNIKODON, kaj diversajn aliajn sistemojn laŭ la prefero de la leganto. Ankaŭ elŝuteblas en pdf-formo. Retadreso: <http://www.bahnhof.se/~fritzon/kvako/>

La espero: Gazeto de la Sveda Esperanto-Federacio. Takso: **xxxxx**. Haveblas en pdf-formo ekde la fino de 1999. Legindaj artikoloj en Esperanto, kaj aliaj artikoloj (verŝajne ankaŭ legindaj) en la Sveda lingvo. Retadreso: <http://www.esperanto.se/espero/>

La gazeto: Takso: **xxxxx**. Uzas UNIKODON. Elektitaj kulturaj artikoloj el diversaj numeroj novaj kaj nenovaj. Retadreso: <http://osiek.org/lagazeto/>.

Monato: Takso: **xxxxx**. Elektitaj artikoloj kaj recenzoj el *Monato* legeblas per unikodo. Ĉi tiu estas unu el la plej prestiĝaj Esperanto-periodaĵoj, kaj ĝia retapero estas modela. Legu ankaŭ pro la e-poŝte havebla eldono de *Monato*, sur p.20 de ĉi tiu numero de *ESK*.

Retadreso:

<http://www.esperanto.be/monato/>

Monda solidareco. Informilo de Monda Fonduso de Solidareco Kontraŭ la Malsato. Tre bone redaktata kaj ilustrata kvaronjara revuo, kun artikoloj pri agado plejparte en la tria

mondo. Domaĝe, la revuo uzas Latin-3-on, kiu estas preskaŭ neplu uzata en la Reto. Legeblaj en la Reto estas numeroj de 1970 kaj 1971. Retadreso: http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/solidareco/monda_solidareco.htm

Ankaŭ troveblas en Interreto, laŭ listo en Virtuala Esperanto-Biblioteko, diversaj bultenoj kaj gazetoj Esperantaj kiuj estis nur dum mallonga tempo enretigataj. La listo en V.E.B. estas tre malnova, kaj multaj adresoj en ĝi ne plu validas. Tamen kelkaj neaktualaj numeroj de tiuj revu(et)oj troveblas en la Reto:

Alumeto: Takso: **x**. De la Kanada Esperanto-Asocio. Uzas la x-metodon por la Esperantaj literoj. Tri artikoloj tre malgrandaj kaj malnovaj. Retadreso: <http://esperanto.ca/kea/alumeto.html>

Amuze: Takso: **xx**. Uzas Latin-3-on por la Esperantaj literoj. La lastaj tekstoj estas el januaro 2000. Aro da interesaj artikoloj kaj pluraj spritaj ŝercbildoj, el du numeroj de la gazeto. Retadreso: <http://esperanto.ca/kea/alumeto.html>

Andaj ondoj. Takso: **xx**. De la Kolumbia Esperanto-Ligo. Nur du numeroj, el 1999, kaj kelkaj artikoloj el 2000. Uzas kaj la h- kaj la x-sistemojn. Interesaj artikoloj diversspecaj. Retadreso: www.geocities.com/andajondoj/

Esperanto ÔC: Takso: **xxx**. Diversaj numeroj el En la Okcitana lingvo kaj Esperanto. Uzas UNIKODON. kvar numeroj el 1996-1998. Retadreso: <http://www.k.shuttle.de/fs1003/EsperantOC/>

Forumo: Samseksama bulteno. Tak-

so: **x**. Ŝajne aperis nur unu numero, tre mallerte enretigita. Retadreso: <http://www.esperanto.net/lsg/forumo/>

Gazeto Andaluzia: Takso: **xxx**. Diversaj numeroj el 1998-2000, unu en UNIKODO, pluraj en Latin-3, iuj per la x-sistemo; kelkaj legeblaj surrete, aliaj en pdf-formo. Artikoloj multtemaj. Retadreso: <http://www.ciudadfutura.com/esperanto/gazeto/>

Juna alumeto: Takso: **x**. Bulteno de Junularo Esperantista Kanada. Diversaj tre mallongaj klubnotoj. Uzas UNIKODON. 13 numeroj el 1994-1999. Retadreso: <http://esperanto.ca/jek/ja.html>

Komputora mondo: Takso: **xx**. Uzas UNIKODON. Ŝajne aperis nur unu numero, en 1998; la artikoloj en ĝi estis mallongegaj kaj ne tre informaj. Tamen rubriko "Konsultejo" enhavas tekstetojn el 2001! Retadreso: <http://esperanto.nu/komputoramondo/>

Kroatia Esperantisto: Takso: **xxx**. Nur unu numero, el 1998. Uzas UNIKODON. Granda nombro da mezlongaj artikoloj multtemaj. Retadreso: <http://esperanto.nu/kroata/>

Kune: Nurgermanlingva eldonajo de Germana Esperanto-junularo. Legeblas ses numeroj: 5 el 1999 kaj 1 el 1970. Retadreso: <http://www.esperanto.de/kune/>

Male: Takso: **xxxxx**. Satira revuo, bele prezentita. Domaĝe, ŝajnas ke nur unu numero aperis. Uzas UNIKODON. Retadreso: <http://esperanto.nu/male/>

Novajoj el Nova Sento: Takso: **x**. Nur unu paĝeto el 1996. Retadreso: <http://www.silab.dsi.unimi.it/>

~gc412712/nse.html

Novjorka prismo: Takso: **xx**. La plejnova numero estas de junio 2000. Kelkaj antaŭaj numeroj el 1996-9 haveblas. Uzas la x-sistemon. Ordinara lokaj informoj/verkaĵoj. Retadreso: <http://members.aol.com/novjorka/prismo/>

Penseo: Takso: **xxxx**. Literatura revuo el Ĉinio. Uzas la x-sistemon. Nur unu numero, el 1997. Retadreso: <http://www.geocities.com/Tokyo/Flats/2394/>

rok-gazet: Takso: **x**. Nur unu tre eta numero, el 2000. Uzas UNIKODON. Retadreso: <http://www.sciuro.demon.co.uk/rokgazet/>

La skolta mondo: Takso: **xxx**. Abundaj priskoltaj artikol(et)oj. Uzas la h-sistemon. Ŝajne nur unujara eldono. Retadreso: <http://geocities.com/CollegePark/Field/9100/97.html>

Starto: Takso: **xx**. El la Ĉeĥa Respubliko. Uzas la x-sistemon. Numeroj el 1999-2000. Diversaĵoj, raportoj. Retadreso: <http://www.clavis.cz/starto/> □

Retterminaj klarigoj:

elŝuti: [Angle: “download”]. ne nur rigardi tekston aŭ bildon en la Reto sed ankaŭ enkomputiligi ĝin por uzo kiam oni ne uzas la Reton.

h-sistemo: skribado de ch gh, hh, jh, sh, u anstataŭ ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ. Tiun sistemon preskribas la Fundamento por kiam oni ne povas presi la supersignitajn literojn.

jpg aŭ **jpeg:** sistemo per kiu komputilo pretigas bildojn por utiligo en la Reto. Preskaŭ ĉiuj bildoj en la Reto estas jpg-igitaj.

kompakt(ig)i: malgrandigi la amplekson de teksto, bildo, aŭ programo

per speciala kompaktiga programo. Kompakt(ig)itaĵoj estas rekoneblaj per la literoj .zip aŭ .sit ĉe la fino de siaj nomoj. Ilin aŭtomate renormaligas specialaj programoj, ekz. Winzip, Stuffit, kc. Retajoj ofte estas kompakt(ig)itaj ĉar ili estas pli fidinde sendeblaj per la telefondratoj.

Latin-3: nun malmulte uzata sistemo ebliganta al komputilo uzi la specialajn literojn de diversaj lingvoj. Por skribi/legi latin-3-tekstojn oni bezonas specialajn literarojn [Angle: “fonts”]. Nuntempe UNIKODO estas kutime uzata anstataŭ Latin-3.

OS 9.1: komputilsistemo uzata de komputiloj Macintosh. Malmultaj uzantoj scias ke ankaŭ per tiu sistemo oni povas skribi la Esperantajn literojn.

OS X: nova komputilsistemo uzata de la kompanio Macintosh. Oni bezonas Macintosh-komputilon aĉetitan dum la pasintaj tri jaroj por uzi ĝin.

pdf: Angle: “Portable document format”. Speciala metodo originigita de la kompanio Adobe por ebligi libroformajn tekstojn en kaj per la Reto. pdf-oj havas ĉiujn karakterizaĵojn de presita teksto. Oni legas ilin per senkostaj legoprogramoj, ekz. Adobe Acrobat Reader, kaj pluraj aliaj.

pgp: senpaga programo kiu enkodigas tekstojn; ĝis nun neniu sukcesis “rompi” la kodon kaj legi neaŭtorizite tekstojn kodigitajn per ĝi.

Retlegilo aŭ **krozilo:** programo per kiu oni legas Retmaterialojn. Aktualaj retlegiloj kutime aŭtomate aperigas unikodajn tekstojn ĝuste. Inter la plej popularaj estas Internet Explorer, Mozilla, Netscape, Opera, ĉiuj estas senpage haveblaj por utiligo per Windows, Macintosh, kaj Linux. Aldone, por Macintosh ankaŭ estas

iCab, kaj Omniweb.

Retserĉilo: Programo kiu kapablas serĉi la Reton kaj trovi deziratajn adresojn aŭ temojn. Diversaj kompanioj starigis tiajn serĉilojn, kiujn oni trovas per la adresoj AltaVista.com., Google.com, Netscape.com, kc.kc.kc. Retlegiloj kutime havas proprajn aŭtomatajn serĉmetodojn kiuj utiligas iun el la popularaj serĉiloj. En Macintosh-komputiloj la enkonstruita programo Sherlock ebligas aŭtomate traserĉi la Reton per pluraj retserĉiloj samtempe.

Unikodo: speciala sistemo por skribi per ĝustaj signoj kaj literoj ĉiun ajn lingvon de la mondo. La supre nomitaj retlegiloj plejparte aŭtomate ĝuste aperigas unikodajn tekstojn en la “okcident-aj” lingvoj, ink. Esperanton. Ĉiuj nuntempaj komputilaj sistemoj uzas unikodkapablajn literarojn. Domaĝe, multaj komputiluzantoj ne scias tion.

Virtuala Esperanto-Biblioteko [VEB]: Kompilaĵo de multaj diversaj retadresoj de Esperantaj aferoj. La kompilaĵo troviĝas ĉe [\[peranto.net/veb/\]\(http://peranto.net/veb/\) Domaĝe, ĝi estis preparita antaŭ multaj monatoj, kaj ŝajnas ke neniu prizorgas ĝin nuntempe. Konsekvence, tre multaj el la retadresoj kiujn ĝi aperigas ne plu validas. Krome, la sistemo uzita por montri la Esperantajn literojn en VEB estas tre eksmoda, do modernaj retlegiloj aperigas tre strangajn signojn anstataŭ la Esperantaj literojn. Malgraŭ ĉiuj misoj, tamen, VEB restas utila komencopunkto por trovi priesperantaĵojn.](http://www.es-</p>
</div>
<div data-bbox=)

x-sistemo: presado per cx, gx, hx, jx, sx, ux anstataŭ ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ. Antaŭ ol UNIKODO haveblis, multaj Esperantistoj uzis la x-sistemon por Retaj aferoj.

Windows aŭ *Vindozo*: komputilsistemoj uzataj de IBM-komputiloj kaj ties imitantoj (“IBM-kongruaj komputiloj”). Preskaŭ ĉiuj tiaj komputiloj uzas Windows 98, Windows 2000, aŭ Windows NT, [variantoj de la originala Windows-sistemo]. Per ĉiuj tri oni povas skribi la Esperantaj literojn. Senpaga programo nomita Supersigno faciligas tion. □

35a ILEI-Konferenco, Lovran, Kroatio

28/07-04/08/01

Raportas Jennifer Bishop

La konferenco de instruistoj altiris preskaŭ 60 partoprenantojn el 20 landoj. Kvar ĉefaj elementoj konsistigas ampleksan programon.

1. La Komitato elektis estraron por trijara deĵorperiodo:

Maŭro La Torre, prezidanto — rilatoj kun AIS/IEI; *Stefan MacGill*, vic-prezidanto, eldona agado; *Agneta Emanuelsson*, sekretario — membraro, landaj asocioj kaj ekzamenoj; *Boomee Kim Lindblom*, kasisto’ *Sab-*

ine Trenner, help-sekretario — lerneja agado; *Jennifer Bishop*, estrarano pri la konferenco kaj flegi kontakton kun FIPLV; *Radojica Petrovic*, estrarano pri instruscienca esplorado, universitata agado, TEJO kaj instruista trejnado

2. Projekto Interkulturo post celebri ĉe 86a UK du jaran enkondukan periodon intencas daŭrigi per helpo de dungota helpanto kun komputilaj lertoj kaj per pli efika lerneja kontak-

to de la nova help-sekretario
<www.interkulturo.org>

3. Du novaj sekcioj akceptitaj: Benino kaj Kroata Esperanto Ligo

4. Universitata agado estas kunordigota kaj promociota.

Krome:

- ILEI membriĝis en Fédération Internationale de Professeurs des Langues Vivantes (FIPLV),

- René Triolle kaj Mireille Grosjean reprezentos ILEI-n ĉe UNESKO

- propono de nova Regularo por Ekzameno de instrukapablo de Esperanto estas prezentita,

- diplomigiĝis Cseh-instruisto Natal-

ja Kasimova kaj Ruben F. Asensio

- prelegis Maŭro la Torre, Stefan MacGill, Ron Glossop, Bill Maxey, Hector Jimenez, Johano Negrete, Ilona Koutny, Juan Ramon Rodriguez Gomez kaj Irina Goncarovam kies tekstoj aperos en sekvaj numeroj de *Internacia Pedagogia Revuo*

- dank' al la profesia aranĝado de Viŝnja Brankovic de ORBIS PICTUS duontaga kaj tuttaga ekskursoj gvidis tra la bela duoninsulo, Istria.

- 36a ILEI-Konferenco okazos 29/07/02 – 02/08/02 en Cumbucco, apud Fortaleza, Brazilo, 03/08/02-10/08/02. (Aliĝilo aperos en *Internacia Pedagogia Revuo* 3/01)

BEATIGO DE PRELATO J.M. SCHLEYER

En junio 2001 S-ro Bernhard Eichkorn, sacerdoto de la diocezo Freiburg (Germanio) proponis al lia Ekscelenco D-ro Oskar Saier, Ĉefepiskopo de Freiburg, la beatigon de du diocezaĵaj pastroj: D-ro Max Josef Metzger (1887-1944) kaj prelato Johann Martin Schleyer (1831-1912).

D-ro Metzger estis ekzekutita en 1944 fare de la nazioj, ĉar internacie li faris proponojn por nova komenco post la Germana malvenko. Post la unua mond-milito li elpaŝis en la porpaca movado kaj kiel socia reformisto; dum la 30aj jaroj li pioniris en la ekumena movado. Li aktive uzis la internacian lingvon Esperanto kaj metis ĝin en la servon de sia Eklezio.

Prelato Johann Martin Schleyer estis la aŭtoro de la plan-lingvo Volapük (1879/80). Ankaŭ li konsideris sian lingvon kiel kontribuon al la porpacaj klopodoj. Pro siaj meritoj li ricevis de papo Leono XIII la titolon monsinjoro.

Formiĝis Internacia Komitato por la Beatigo de Prelato Johann Martin Schleyer al kiu ĝis nun apartenas: André Albault, Bernhard Eichkorn, Reinhard Haupenthal, Andy Künzli kaj Gonçalo Neves.

La komitato celas kolekti subskribojn kiuj apogos la proponon faritan al la ĉefepiskopo. Tiucele kontaktiĝos ĉiuj lokoj kie Schleyer laboris kiel pastro. .

La urbestro de Konstanz estis petita deklari la tombon de Schleyer historia monumento.

Kiu deziras subteni la proponon pri beatigo de Schleyer aŭ/kaj Metzger, bv. sendi deklaron kun persona subskribo al la sekretario de la Komitato.

Sekretariejo: BP 19, F-84340 Malaucene, Francio.

E-poŝte:

<SchleyerKomitee@aol.com>





El la Regionoj



Vic: La aktuala estraro de Melburna Esperanto-Asocio estas:

Prezidanto: Marcel Leereveld;

Vicprezidanto: Suzanne Holton;

Kasisto: Frank Braham;

Sekretario: Kam Lee.

Nov-Zelando: Brian kaj Jackie Fox nun havas novajn adreson kaj telefonnumeron: Unit 89 Crestwood Village, 38 Golf Road, Titirangi Auckland 1007.

Qld: Je la 16a de junio, 13 Esperantistoj (kaj onta esperantisto, Laura, la filineto de Jay) renkontiĝis ĉe Parko-Queen's en Ipswich. La vetero estis perfekta — la suno brilis en sennuba ĉielo. Ni ĉiuj portis niajn puloverojn ĉar estis iom malvarme. Tiuj el Toowoomba kaj Oakey fakte portis plurajn puloverojn ĉar kiam ili forlasis la hejmon, la temperaturo estis tre malalta (minus 5° C).

Post kafo kaj kuko, ni esploris la malgrandan bestĝardenon en la parko. Tie ni vidis iom da kontentaj Aŭstraliaj bestoj, kiel vombatoj, valabioj kaj kanguruoj; krome, estis birdoj tra kiu ni povis promeni.

Erhard trovis por ni Japanan ĝardenon. Mi ne sciis ke estas tia ĝardeno tie, do estis agrabla surprizo trovi kaj esplori ĝin. La unua sekcio estis finita en majo ĉi tiun jaron, kaj nun oni preparas la duan. En Japanio, la ĝemel-urbo de Ipswich estas Nerima. Helpo estis ricevita el Nerima plani la ĝardenon.

Post lunĉo, Hazel montris al ni belaspektajn broŝurojn senditajn al ŝi de John Gallagher (sekretario de AEA) el Launceston. Li proponis ke la Somerkursaro okazu tie dum januaro 2002.

Ni diris: “Ĝis la konferenco en novembro” kaj ekiris hemjen. — Raportis Kay Andersen. [El *Brisbana Babilado*]



POR RIDIGI VIN



Diris knabo en lernejo al alia ke la plej multaj plenkreskuloj kaŝas almenaŭ unu sekreton. Tial ili povas ĉantaĝi dirante: “Mi konas la tutan veron!” eĉ kiam ili ĝin ne konas.

La alia knabo iras hejmen kaj diras al sia patrino: “Mi konas la tutan veron!”

Tuj la patrino donas al li \$20 dirante: “Diru nenion al via patro!”

Revenas la patro de sia laboro. Diras la knabo: “Mi konas la tutan veron!”

Tuj la patro donas al la knabo \$40 dirante: “Diru nenion al via patrino!”

La postan tagon la knabo renkontas la poŝtiston antaŭ la pordo. Diras la knabo: “Mi konas la tutan veron!”

La poŝtisto surteren metas la leterojn, malfermas siajn brakojn, kaj diras:

“Venu kaj ĉirkaŭbraku vian paĉjon!”

Akuzanto: “Ĉu vi mortigis la viktimon?”

Akuzato: “Certe ne !”

Akuzanto: “Ĉu vi scias kiel ni punas tiujn kiuj mensogas?”

Akuzato: “Jes, multe malpli severe ol tiujn kiuj mortigas!”

[El *Tamen Plu*]

Odlo Bokserp: Lia paĝo

Mi fine konvinkis nian karegan Reaktoron disponigi al mi mian propran rubrikotitolon: “Odlo Bokserp: Lia paĝo”, kiun vi vidas ĉisupre. Bonvolu sendi viajn gratulojn al mi p/a la Tutmonda Pingvena Esperanto-Asocio, de kiu mi estas honora¹ vicprezidanto². Sur la unua paĝo de ĉi tiu numero de *ESK* vi ne vidas la fondokunvenon de nia tutmonda Asocio³, sed se ĝi ja troviĝus tie, kaj se vi rigardus tre atente, vi ne sukcesus vidi mian foton.⁴



Reveninte al la Insulo⁵, mi ricevis la ĉisekvan komunikaĵon de mia Nov-Zelanda amiko Donald Rogers. Li skribis al mi:

Mi serĉis recenzojn pri New Oxford Dictionary of English per Google⁶ Mi trovis alsendon al

¹ La atesto kiun oni donis al mi diras “senhonora”, sed evidente temas pri skriberaro de la Prezidanto.

² Mi sidis sur la ovojn de la Prezidanto, sed frakasis nur du el ili.

³ Nia ĉiamkompleza Reaktoro (laŭdon al li!) forstrekis ĝin, sed mi sukcesis tamen meti ĝin ĉiekstren. →

⁴ Mi estas tuj malantaŭ la Prezidanto, kiu estas la dua pingveno de dekstre. Ial li ne volis ke mi estu tro videbla, nek liaj frakasitaj ovojn...

⁵ Aŭstralio.

⁶ La plej ampleksa ret-serĉilo nun uzata.

http://www.nibnet.com/NODE.htm, kiu proponis fari por mi Anglalingvan tradukon. Post aro da hieroglifaĵoj mi ricevis ĉi tion:

Offer for Teaching of English
Kind Teaching

acquiring in Bookcase THE NEW OXFORD DICTIONARY OF ENGLISH It will straight have to one copy HOMAGE to chosen between the titles them available in bookcase, of the Classics of the English Literature of the prestigiosacollana OXFORD WORLD's CLASSICS.

She will not have to make other that to print the module brought back here, to fill up it and to deliver it to the bookseller to the moment of the purchase of the Dizionario. Non she loses l'occasione to acquire the greatest dictionary of the English language in a single volume and to receive unimportante homage.

Kiel tio ne allogus tuj mendi la vortaron...kiu, espereble, estas pli klare verkita ol la tradukita reklamo/recenzo? Kaj laŭdon al la permaŝina tradukado (?????????) □



Estrarkunstaro dum la Unua Kunveno de la Tutmonda Pingvena Esperanto-Asocio

LA AŬSTRALIA KAJ LA NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

Prezidanto: *Jennifer Bishop*, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122.

☎ 03 9818 7358 (AH), 03 9905 2806 (BH); : 03 9905 3668 (BH).

esperanto@education.monash.edu.au

Vicprezidantoj:

Franciska Toubale, 1 Marne Rd, Mt Evelyn Vic 3796.

franciska@bigpond.com

Hazel Green, 44 Toowoomba Rd, Oakey Qld 4401.

hazgreen@tmba.design.net.au

Sekretario:

John Gallagher, 81 Lalla Road, Lillydale Tas 7268.

abcetc@ozemail.com

Vicsekretario:

Bob Felby, 6 Dorset St, Semaphore Park SA 5019.

☎ (08) 8242 1460.

esperantobob@picknowl.com.au

Kasisto:

Stephen Pitney, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

Pitney@Cybernetint.net

Vickasisto:

Frank Braham, 5 Marriot Rd, Moorabbin Vic 3189.

fbraham@aol.com

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

Prezidanto:

Bradley McDonald, PO Box 12 103, Auckland 1135.

☎ 09 579 4767, 📠 09 579 1070.

neelam@voyager.co.nz

Sekretario:

Howard Gravatt PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035, New Zealand.

☎ 09 626 6129.

hgravatt@ihug.co.nz

Kasisto:

Jackie Fox, Unit 89 Crestwood Village, 38 Golf Road, Titirangi Auckland 1007. ☎ 09-826

2081. brianandjackie@abztrak.co.nz

KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio: <http://www.esperanto.org.au/>

AŬ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la Kasisto de AEA: Stephen Pitney, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

<http://www.geocities.com/esperanto-nz>

NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: *Jackie Fox*, Unit 89 Crestwood Village, 38 Golf Road, Titirangi Auckland 1007.

Unuopaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*:

Por membroj, AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Mendu de la Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio:

€23.70, pagu al la konto aeal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 2001 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas ©2001 de la Aŭstralia kaj la Novzelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de ESK estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac DV SE, la programo uzita estas FrameMaker. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook. La reteldono estas preparata per Power Mac 7200, kaj Acrobat.

Specialaj kunlaborantoj:

Odlo Bokserp, I.N.K, K.R.A.J.O.N, K.R.E.T
Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmisistoj

Vera Doloro, L.M.K.
[lia multsuferranta kontrolanto]

La estraro de la Tutmonda Pingevena Esperanto-Asocio
ĉiuj ĉiuj prezantoj de la Galaksio

TRANSLATION CONTEST

2001/2

Our previous contest concerned a leaflet concerning the Australian National Botanic Gardens. This time the contest is to make an Esperanto translation of the leaflet itself. The best translation will receive a prize of two major recent Esperanto books (to be chosen by the winner from a list provided by the editor); all other entries will receive an Esperanto book chosen by the editor. Translations must be received by August 10. They may be sent by e-mail to <sudakruco@sudakruco.org>; or if e-mail is not available to you, by regular mail to the editor: Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302, Australia. For preparation of the translation, we strongly advise use of the 4th edition of *Australian & New Zealand Esperanto Dictionary*, edited by Ralph Harry and Brian Fox, pub. 2000 by AEA & NZEA.

The text to be translated:

Visitor Guide

Australian National Botanic Gardens

About the Gardens

The Australian National Botanic Gardens occupies land which lies at the junction of the territories of the Ngunnawal, the Ngarigo and the Walgalu Aboriginal peoples. It is thought that the name Canberra is an Aboriginal word meaning "a meeting place".

After European settlement in the 1830s, much of Black Mountain was cleared and used for grazing.

Part of the Gardens site was still a dairy farm as late as 1950. The first trees at the Gardens were planted in 1948 and the Gardens as we know them today were developed during the 1950s and 1960s before being officially opened to the public on 20 October 1970.

(Picture caption: A huge variety of unusual Australian plants collected from the wild are displayed in attractively landscaped settings.)

Discover the Diversity of Australian Plants

Australia is so vast and our native flora is so varied that it would be virtually impossible for anyone to see most of our native plants in their natural habitats. The role of the Australian National Botanic Gardens is to bring together in one place a representative collection of living and preserved specimens of Australian plants and their relatives.

We aim to share with our visitors the beauty and diversity of Australia's native plants and to tell the fascinating stories of their evolution, adaptations to the environment, conservation and interactions with people.

The Gardens is a living experiment. Many of the plants seen here have never been cultivated before. Our horticulturists manipulate the soils, microclimates, water supplies and nutrients of the site to grow some 7,000 of the 17,500 species which occur naturally in Australia. Those that can't be grown outside are grown in glass-houses or in pots under cover.

(Picture caption: Grasstrees, *Xanthorrhoea* species, are distinctive icons of the Australian flora.)

The landscape of the Gardens is designed to present plants in an informal way. Plants from similar environments are displayed in areas such as the Rainforest Gully and Mallee Sections. Other areas, such as the Wattle Sections (*Acacia* species), display the diversity of plants in a botanical group. Plants at risk of extinction in the wild are incorporated in the displays for study and conservation purposes.

Botanical Science

All the plants in the Gardens are recorded on a data base, and labelled with the current scientific name. The basis for their identification and naming is the reference collection of preserved plants in the Australian National Herbarium at the Centre for Plant Biodiversity Research. The Centre is a partnership between the CSIRO Plant Industry and the Gardens and is a national leader for research into the classification, evolution, ecology and conservation of Australian plants. Scientists at the Centre provide support for the Gardens' Public Herbarium and the plant identification and information service.

(Picture captions: *Patersonia sericea*, a native iris.

Unfurling treefern fronds.

The Main Path provides easy access to all the most popular features of the Gardens.)

As well as correctly naming plants, the Gardens keeps records of their origins, horticulture and biology. The living plants and their records are valuable resources for conservation, revegetation, horticulture and plant classification studies.

Sharing the Message

The Gardens actively promotes the value and beauty of Australian plants and their conservation. A variety of educational programs is conducted for people of all ages. Exhibitions, special events, lectures and guided walks are held to provide enjoyable and interesting opportunities for visitors to appreciate our native plants. Informative signs throughout the Gardens add an extra dimension to any visit.

Enjoy Yourself!

Most importantly, the Gardens is a great place to relax and enjoy nature. Relax at the Café, browse through the Bookshop or just enjoy the beautiful natural surroundings. Watch out for programs of concerts and other activities that are held throughout the year.

(Picture caption: Enjoy a garden tour with one of our friendly Volunteer Guides)

The Visitor Centre is open 9.30 am to 4.30 pm every day and has helpful staff, changing exhibitions and a wealth of information about the Botanic Gardens.

A Public Herbarium and reference books are available in the Visitor Centre to help visitors to identify native plants and weeds of south-east NSW and the ACT. Native plant identification and information services are also provided by scientific staff of the Gardens.

Ask about easy access to the Main Path and all public buildings. Wheelchairs are

available for loan.

Trained volunteer guides lead free Garden walks daily, group tours by arrangement, phone 6250 9438.

Indoor and outdoor venues for meetings, weddings or any special occasion are available at the Gardens.

For more information about the Gardens, facilities and services call the Visitor Centre on 6250 9540.

The Education Unit provides programs for school groups and community groups of all ages. For more information phone 6250 9547.

Hudsons at the Gardens serves light, fresh food and is open every day from 9.00 am to 4.30 pm. For reservations phone 6248 9680.

The Botanical Bookshop is located in the Visitor Centre and has Canberra's best range of nature publications, souvenirs and gifts. Open 9.30 am to 4.30 pm every day; phone 6257 3302.

Support the Gardens by becoming a member of The Friends of the Australian National Botanic Gardens. The Friends run a varied program of activities and members also receive a number of benefits including a newsletter, free parking and discounts. For more information about the Friends phone 6250 9548.

(Picture caption: The Ducrou Pavilion is one of several venues which are available for hire at the Gardens.)

Welcome to the

Australian National Botanic Gardens
growing, studying and promoting Australian plants

Please help us to protect Australia's finest collection of native plants:

- don't pick flowers or damage or remove plants
- walk on the paths, not on the garden beds
- don't climb rocks or trees
- pets and horses are not allowed
- no fires or barbecues
- no ball games, frisbees or kites
- don't feed the wildlife

This is a pedestrian area:

- bicycles and private vehicles are not allowed past the carpark.
- skateboards, scooters and rollerblades may not be used in the Gardens.

There are no rubbish bins in the Gardens — please take your rubbish away with you.

The Gardens are open from 9 am to 5 pm every day of the year except Christmas Day.

Enjoy your visit

(Picture caption: Eastern Water Dragon)

(Picture captions around map: The Eucalypt Lawn displays a large collection of

Australia's best known tree species and is a lovely setting for picnics, concerts and other public events.

Many native bird species find a haven in the Gardens.

Bracteantha 'Bright Bikini' is one of the many cultivars displayed in the Gardens.

The Rainforest Gully is a cool and shady green haven to explore on a hot day.

This beautiful frost-tolerant Waratah, 'Braidwood Brilliant', was bred at the Gardens and is now widely available in commercial nurseries.

Christmas Bells, *Blandfordia grandiflora*, are a summer feature of the Sydney Region Gully.

Like most banksias, *Banksia brownii*, a rare species from Western Australia, flowers in winter.)

Guided Walks

Free garden tours lead by our Volunteer Guides leave the Visitor Centre daily, contact the Visitor Centre on (02) 6250 9540 for times. Special walks can be booked for groups, two weeks' notice preferred, please leave details of your requirements on (02) 6250 9438.

The Main Path circuit (1.4 m, 40-60 minutes return) is ideal for a leisurely stroll around the Gardens. It has no steps and is suitable for stroller and wheelchair access.

Ask at the Visitor Centre if you would like information about the Black Mountain Summit Walk to Telstra Tower.

Classification and Plant Names

There are several hundred thousand different types of plants in the world. In order to study all this variety, scientists divide plants (and other living organisms) into groups with similar characteristics. This is called classification. The major groupings used in modern classification are: kingdom, division, class, order, family, genus and species.

The scientific names given to plants are closely linked to their classification and how they are related to each other. Each species has a two-part scientific name which is only used for that species; its genus (a noun with a capital letter) and its species (an adjective without a capital letter) and both these names are usually printed in italics eg *Telopea speciosissima*, the NSW Waratah. Many plants also have common names, but these names are often used for more than one species and some plants have more than one common name. Not all Australian plants have a common name.

There are several types of plant labels used at the Australian National Botanic Gardens. Smaller labels have only the scientific name of the plant, larger labels may also include the family, common name (if there is one) and a distribution map. If you would like more information about a particular plant, take a note of the name and the location (section numbers are placed at the edges of beds) and ask at the Visitor Centre.